

Emil Rittershaus,
Vestfalia-kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Vi gloru Rejnnon, la fieran,
Jen en la lando de la vin';
Min, kie oni ercon feran
Elfosas, lulis la patrin'.
Surmonte staras abiar',
Travale iras bovo-ar',
Kaj staras kiel gard-starant'
Kverk-arbo ĉe la korto-rand'.
Jen en lulilo kuŝis mi.
Salutas mi vin, Vestfali'!

2. Ni ne parolas kun vi flate,
ne uzas dolĉajn vortojn ni,
ni ne salutas vin tuj frate,
frat-kison donas ne al vi.
Bonvena estas vi nur, se
atentas vi la ŝajnon ne.
Rigardu rekte al la kor'!
Rekteca estas nia mor'.
Interesiĝas ni ne pri
malvaloraĵ' en Vestfali'!

3. Kaj niaj inoj kaj knabinoj,
Ne amas ili por plezur',
La ĉarmaj amo-ŝpinistinoj,
Pro ŝerca amorado nur!
Anĝelo pia gardas, ke
Malfideliĝu ili ne.³
En ĝoj' fidela kaj dolor'
Ĝis morto restas kara kor'.
Beata estas vi, se vin
Brakumas Vestfalia in'.

...

³aŭ: De l' rekta voj' foriru ne.
aŭ: Survoje ili falu ne.

4. Vin gardu Dio, tero mia,
Vi lando de l' hero' Armin'!
Ĝis kuŝos mi en tombo ia,
Adoros mia koro vin.⁴
Ho, kara lando Vestfali',
Fortega lando estas vi,
Mortante, vin en lasta hor'
Ankoraŭ benos mia kor'!
Land' inter Rejno kaj Vezer',
Salutas mi vin kun sincer'!

*Traduko de la Germana poemo "Westfalienlied" de EMIL RITTERSHAUS (*1834-04-03 - †1897-03-08) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2005-10.*

Arg-329-664 (2012-11-30 09:40:54)

Pri la verkinto Emil Rittershaus troviĝas informoj en la interreto sub <http://www.westfalienlied.de/westfalienlied3/lied.htm>.

⁴Pensad' pri vi ĝojigos min.